

Svisa Esperanto-Societo informas

1997 numero 4-a: oktobro 31-a

Redakcio: Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

☎ ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29; indiki: por Claude Gacond


Metodika Tago en Berno

15an de novembro
09h45-12h15 kaj 13h45-16h45

HVA-Fachschulen

Schwanengasse 11

(5 minutoj de la stacidomo)



Studo-temo:

Instruo al komencantoj per la bildo-kurso:

Enkonduka kurso de esperanto
Cours d'initiation à l'espéranto
Esperanto-Einführungskurs
Introduzione all'esperanto

Tiu ĉi bildo-kurso programita de Claude Gacond kaj perfektigita kun aro da kunlaborintoj: Maŭro De Sassi, Ueli Hänni, Stefano Keller, Perla Martinelli, Jean-Jacques Lavanchy, Olivier Tzaut, Henri Vatré, ktp., post pli ol du-dek-jara eksperimentado, transformiĝis al tre fleksebla instru-materialo utiligebla ie ajn. Tenilo ebligas prezenti kiel funkcias esperanto per du afiŝaroj fotokopie reprodukteblaj.

Kiel oni farus en porinstruista seminario, Claude Gacond klarigos ne nur kiel tiu ĉi kurso devas esti utiligata, sed ankaŭ ĝiajn metodikajn fundamentojn. Kiuj jam prove elprunte utiligis ĝin havos la okazon raporti pri la koncernaj uz-eksperimentoj.

Kontraŭ sumo de CHF40.- ĉiuj povos akiri la kurs-materialon: la tenilon, ambaŭ afiŝarojn, la metodikan konsilaron kaj specimenon de la materialo disdonota al la lernantoj. La vendo-

prezo kovros nur la produkto-koston de tiu instr-materialo.

Por povi pretigi tiun materialon, Claude Gacond devos koni la ekzaktan nombron de la partoprenontoj, tial ni petas la interesojn kiel eble plej rapide sendi sian aliĝon al Bruno Graf, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen. aŭ ☎(031) 921 44 59, indikante siajn nomon, adreson, telefonnumeron kaj ĉu kun aŭ sen tagmanĝo kunvianda aŭ vegetarana (manĝoprezco inter CHF 15.- kaj 20.-) Gejunuloj, kiuj ne mongajnas, povas peti repagon de veturkostoj samtempe kun la aliĝo.

Espreble ĉiuj esperanto-grupoj delegos almenaŭ po unu reprezentanton al tiu metodika tago. Oni komprenu, ke rajtos utiliĝi tiun efikan instruilon nur instruantoj ricevintaj la necesan didaktikan formadon.

Dum la koncerna metodika tago momento estos rezervita por la konkludo de la priekzamena diskuto fare de la membroj de la Svisa ILEI-Sekcio, ke precizajn informojn povu transdoni ilia prezidanto François Randin al la komitato de KCE.

Kaj tutcerte alia momento ebligis malfermi diskuton pri la dezirindaj metodikaj tagoj kaj fiksi daton de venonta pedagogia renkontiĝo.

Vivo de SES

Parolas la prezidanto

Depost kiam mi prezidantiĝis, mi konstatas pli kaj pli, ke multo estas farenda kaj ke mankas kompetentaj kunlaborantoj. Jam lerni esperanton postulas energion kaj intelekton, agadi aktive ankoraŭ multe pli

La respondeco kuŝas sur tro malmultaj ŝultroj. Ofte estas la samaj personoj, kiuj renkontiĝas kaj aktivatas. Sekve ni devas iĝi pli multnombraj kaj kompetentaj.

Nia ĉefa tasko estas informi, varbi kaj instrui (nenio nova por vi, ĉu ne!). En tiuj fakoj ni devas lertiĝi kaj spertiĝi. Ni planos rendevuojn kaj kurstagojn por gvidantoj kaj aktivuloj. Plikleriĝi estu nia devizo.

Unua grava evento estis la seminario "Kiel informi pri esperanto" okazinta komence de 1995 en Lucerno.

Ni nun celas la trejnadon de instruantoj kaj alvokas al partopreno en metodika seminario: "Kiel instrui esperanton al komencantoj", kiun gvidos Claude Gacond la 15-an de novembro en Berno. Vidu la koncernan programon en tiu ĉi numero de *SES informas*. Vi povas aliĝi senkoste, egale ĉu membro de SES aŭ ne, JES-anoj estas tre bonvenaj. La estraro atendas vin kaj esperas,

ke la lokaj grupoj delegos intru-
emajn interesulojn.

Tiaj renkontiĝoj havu plurajn
efikojn. Vi akiru kompententon,
memfidon, kuraĝon, kontenton en
la arto prezenti nian produkton
esperanto. Tio ege necesas.

Bruno Graf, prezidanto.

Enketo ĉe la SES-anoj

Ĉu vi legas la kulturalan revuon
Literatura Foiro, kiun vi ricevas
ĉiun duan monaton? Ĝi entenas
regule paĝojn de svisaj aŭtoroj.
Estas konate, ke la intereso de
legantoj estas diversaj.

Ĉu vi preferus ricevi la gazeton
Heroldo de Esperanto anstataŭ la
revuon *Literatura Foiro*. LF-koop
nun eldonas ambaŭ organojn.
Redaktoro de *Heroldo de
esperanto* estas Perla Martinelli.
Se jes, bonvolu skribi al LF-koop,
CP 232, 6830 Chiasso 1. La
eldonanto kaj SES decidus, ĉu
indas kaj eblas prezenti
alternativan oferton.

Laborgrupo por varbado

Konstantinte, ke esperanto-varb-
iloj aktualaj kaj modernaj mankas,
la estraro de SES starigis labor-
grupon, kies celo estas:

Eltrovi kaj ekzameni ĉiajn ebl-
ecojn de varbado: kiel SES kune
kun lokaj grupoj kaj membroj
povus varbi pli efike.

Proponi novajn ilojn, teknikojn,
metodojn, ktp.

La laborgrupo ĝis nun konsistas
el la SES-prezidanto Bruno GRAF
(Berno), Anĝelo Mellini
(Lucerno), Nicole Margot kaj
François Randin (Laŭzano).
Bruno Graf invitas la esperanto-
grupojn delegi kapablan personon
al tiu laborgrupo. Temas pri 3
kunsidoj jare kun repago de la
vojaĝkostoj. Kunlaboremuloj bon-
volu sin anonci al Bruno Graf.

Pri la nova estraro

En *SES informas* 97-3 ni faris
eraron koncerne la adreson de nia
kasisto. Jen ni redonas ĝin:
Ernst VON MAY, kasisto, Flur-
strasse 3, 9242 OBERUZWIL.
☎ 071 911 68 30.

Ĝenerala Kunveno

de la 15a de marto 1997

Hotelo Jardin, Berno

Protokolo

Ĉeestis la estraranoj prezidanto
Perla MARTINELLI, vicprezid-
anto Claude GACOND, kasisto
Ernst VON MAY, sekretario kaj
alemana reprezentanto Anĝelo
MELLINI, kaj romanda reprezent-
anto Nicole MARGOT, 16 pliaj
SES-anoj kaj 3 gastoj. Senkulp-
iĝis Nicole BÉROUD-FOCKE,
Tazio CARLEVARO, Ueli

HAENNI, Mireille GROSJEAN kaj Fritz LIECHTI.

La prezidanto malfermas la kunvenon je la 11h10.

1. Kiel tagprezidanto elektiĝas Giorgio SILFER, kiel voĉnombrantoj Claude GACOND kaj Anĝelo MELLINI kaj kiel tagprotokolanto Sonja BRUN.

2. **Komunikoj:** Post la anonco de la senkulpigoj la prezidanto informas, ke Tazio CARLEVARO eksiĝas el la estaro kaj el siaj aliaj aktivajoj pro profesiaj kaŭzoj, sed ke li pretas daŭre zorgi pri la adresetikadoj, pro kio li meritas dankon.

3. **Aprobo de la protokolo:** Ĝi estis publikigita en *SES informas* 1996-6. Giorgio SILFER proponas jenan ŝanĝon: paĝo 8, traktaĵo 7, unua frazo: "...kunveno de la Kultura *Konsilio* kaj la *assembleo de KCE*, ..." Kun 1 sindeteno la ŝanĝo akceptiĝas, kaj tiel ŝanĝita la protokolo de la lastjara kunveno estas unuanime akceptita.

4. Raportoj:

Agada raporto: En sia agada raporto Perla MARTINELLI, kies trijara prezida mandato ĉesas, skize rerigardas al la 3-jara estrara periodo. Ŝi dankas al la estraranoj pro ilia subteno kaj atestas, ke SES estas ja malgranda, sed vivanta asocio. Ŝi mencias la ĉi sekvajn atingojn:

UEA: Kun David BÜHLMANN SES havas bonan komitatanon ĉe UEA.

SES: Sub la atingoj menciindas la **statutŝanĝoj** kaj la **5-kapa estraro** memdecida pri la taskoj. Speciala sukceso estas la starigo de **svisa ekzamen-regularo** en kunlaboro kun KCE. Inter la **servoj al la membraro** estas menciinda la regula apero de *Literatura Foiro (LF)* kaj de *SES informas (SI)*. Fritz LIECHTI, la multjara redaktoro de SI, eksiĝis fine de 1996. Al li iru kora danko pro la farita granda laboro. Kun Claude GACOND, la nova redaktoro, SI estas denove en bonaj manoj. Dankon ankaŭ al li pro la transpreno de la tasko. La *regionaj kulturaj semajnfinoj* okazis regule kun bona sukceso en la tri lingvo-regionoj. Dankon al la kasisto Ernst VON MAY, kiu ŝatus eksiĝi, sed tamen pretas deĵori plian jaron por helpi al la nova prezidanto. La rilatoj kun la aliaj svisaj organizaĵoj SAEF, KCE, CDELI kaj kun la lokaj grupoj estis bonaj. Tiuj lastaj ne hezitu peti helpon de SES, speciale kiam temas pri subvenciado de agadoj.

Perla MARTINELLI, kvankam ne rekandidatiĝanta kiel prezidanto, tamen pretas resti en la estraro. Konklude ŝi esprimas sian kontenton pri la pozitiva etoso reganta en la societo kaj ĉagrenon, ke ne eblis allogi gejunulojn.

Claude GACOND kore dankas nome de ĉiuj al Perla MARTINELLI kaj informas, ke ŝi iĝis svisa ŝtatanino, akirinte la civitancon de La Chaux-de-Fonds.

Financa raporto: Ernst VON MAY klarigas la buĝeton kaj esprimas la esperon, ke la donacoj restos almenaŭ samsumaj spite al la ekonomiaj malfacilaĵoj. La interezoj daŭre malaltiĝas, sekve malkreskas la enspezoj interezaj. La mono destinita al *la tago X* estas enkalkulita sub la punkto *informado kaj varbado*, kaj la kapitalo enpagita por *la Agado 2003* kuŝas en aparta bankkonto.

Raporto de la kaskontrolantoj: Ernst GLÄTTLI atentigas, ke la punkto **raporto de la kaskontrolantoj** mankas en la tagordo. Aldone al la revizora raporto aperinta en SI 1997-2, li substrekas la akuratan librotenadon kaj bonan klasadon de la dokumentoj kaj pruviloj. Aplauĉo esprimas ĝeneralan dankon al Ernst VON MAY kaj al la revizoroj.

5. Diskuto kaj aprobo de la raporto:

Agada raporto: Giorgio SILFER opinias, ke servo de SES povus esprimiĝi per subvencio al la SES-anoj por aliĝkostoj en regionaj kunvenoj. Stanislaw POCHANKE demandas, kial neniuj salutis la Universalan Kongreson en Prago nome de Svislando? Da-

vid BÜHLMANN respondas, ke li ne estis invitita kaj Sonja BRUN opinias, ke pro tempomanko la nombro de salutantaj reprezentantoj estis limigita. Tiuj respondoj ne kontentigas plurajn ĉeestantojn kaj ĝenerala diskuto kondukas al la sekva propono: *La UEA-ĉefdelegito por Svislando sendu elĉerpajon de la protokolo al UEA kaj esprimu la bedaŭron de la ĝenerala kunveno de SES, ke la svisa komitatano ne estis invitita saluti la kongreson en Prago.* Rezulto de la voĉdono: aprobo: 6, kontraŭ: 3, sindetenoj: 8. La tuta agada raporto akceptiĝas unanime kun 1 sindeteno.

Financa raporto: Giorgio SILFER diras, ke la bilanca sumo de GEP-konto 079 fine de la jaro estis 3'900.- malpli, do nur 15'049.60. Sumo de 3'900.- kuŝas ĉe UEA je dispono de SES. La kasisto respondas, ke pro malfrua alveno de la kalkuloj de GEP li ne sciis tion je la fino de 1996, kiam la bilanco estis farita. Li konfirmas, ke hodiaŭ la konto 079 enhavas 15'049.60 kaj ke la sumo de 3'900.- repagita de UEA iris al la konto SKA. Dietrich WEIDMANN enketas, ĉu parto de la 27'671.- en kuranta konto ne povus esti pli bone investita. La kasisto agnoskas, ke tia propono jam fariĝis lastjare en Neuchâtel, ke li ankoraŭ ne serĉis solvon kaj ke li preparolos tion kun la estraro.

La bilanco estas akceptita per aplaŭdo.

6: Ratifo de la Ekzamena Regularo: La tagprezidanto rekomendas preterlasi la artikolojn 4-8, kiuj havas teknikan karakteron, kaj doni specialan atenton al la art. 1-3 kaj 9-14. Li donas 5-minutan tempon por atenta tralego de la koncernaj artikoloj de la *Regularo por Esperanto-ekzamenoj en Svislando*, kiun ĉiu trovis antaŭ si komence de la kunveno.

Komence de la diskuto Ernst GLÄTTLI informiĝas, ĉu ne estas malĝusta momento por tia decido, ĉar oni ne ricevis la dokumenton antaŭ la ĝenerala kunveno. Giorgio SILFER respondas, ke temas ne pri aprobo, sed nur pri ratifo. La sugesto de Dietrich WEIDMANN ratifi nun kaj havi la eblon por postaj amendoj estas kontraŭstarata de la tagprezidanto, kiu argumentas, ke trairi artikolon post artikolo ebligis tuj doni la necesajn klarigojn sen troa tempo-perdo. Jen la demandoj, kiujn vekis tiu tralego, kun la respondoj de la tagprezidanto Giorgio SILFER:

Art. 3: Nicole MARGOT: Kia estas la matureca grado de la ekzameno kompare al tiu de la naciaj niveloj? - Ĝi egalas al la finstuda ekzameno antaŭ ol eniri la universitaton. Dietrich WEIDMANN: Do ne ekzistos universi-

tata nivelo? - Pli alta diplomo estas akirebla ĉe la Esperanto-fako de ELTE-Universitato en Budapeŝto.

Art. 9 punkto a: Stanislaw POCHANKE: Ĉu eksterlandaj atestiloj ankaŭ estas akceptitaj? - Jes, se ili estas akceptitaj en la koncerna svisa kantono. Dietrich WEIDMANN: Se temas pri ekzamenaj atestiloj de eksterlandanoj ne frekventintaj ŝtatan lernejojn, kia instanco decidus? - Oni certe ekzamenos, kian studnivelon ili atingis. Claude GACOND aldonas, ke okaze de dubo oni trapasigas elementan aŭ mezan ekzamenon al la kandidatoj je matureca nivelo.

Art. 11: Giorgio SILFER aldonas, ke la rajtigo por organizo de ekzamenoj povos esti donita unu fojon por longa daŭro.

Art. 12: Paul SCHERER: Kion kompreni sub la esprimo *baza vortaro*? - Tio venos kun la studprogramoj, kiuj ankoraŭ ne estas findeciditaj.

Art. 13: Giorgio SILFER klarigas, ke la romanĉa lingvo aldoniĝos, kiam ekzistos gimnaziaj ekzamenoj en tiu lingvo. Dietrich WEIDMANN proponas mencii lingvojn, ĉar ekzemple en Zŭrich estas parolataj pli ol niaj kvar naciaj lingvoj. - La ekzamenatoj povas esti de iu ajn lingvo aŭ ŝtato, sed devas koni unu el la svisaj lingvoj.

Art. 15: Claude GACOND klarigas, ke provizora normo estas necesa, ĉar la nivelo de la svisaj ekzamenoj estas pli serioza, ol tiu de UEA/ILEI nuntempe. Stanislaw POCHANKE: Kial neniu mencio pri kiu rajtas instrui? - Ĉar ja ankoraŭ ne estas provizo de diplomitaj instruistoj. Claude GACOND aldonas, ke estas diversaj postuloj flanke de la kantonaj, kaj ke la proceduroj kun la kantonaj instrudepartementoj estas longdaŭraj. Studprogramoj devas esti senditaj kune kun la regularoj pri la ekzamenoj.

Dietrich WEIDMANN proponas amendojn: a) Ekzistu komisiono aŭ KCE havu la rajton por prijuĝi ekvivalenton kaj akcepton de eksterlandaj diplomoj. b) Estu transira periodo, dum kiu oni decidus, kion fari kun la nuntempaj instruistoj.

La tagprezidanto proponas ratifi la regularon kun la sekvaj tri rekomendoj al la estonta kunsido de KCE:

1) Studprogramoj: Kiam la studprogramoj estos difinitaj, ĉiuj grupoj devos esti invititaj partopreni la kunsidon.

2) Provizora normo: Speciala atento necesas pri la eksterlandaj gastlaboristoj.

3) Instruistoj: KCE ne estu tro severa rilate al la ĝisnunaj instruistoj.

La regularo estas akceptita unuane kun 2 sindetenoj.

Interrompiĝas la kunveno pro la tagmanĝo

7: Elekto de la nova estraro: Jenaj personoj estas proponataj por elekto: Nicole BÉROUD-FOCKE, Bruno GRAF, Nicole MARGOT, Perla MARTINELLI, Anĝelo MELLINI, Barbara POCHANKE kaj Ernst VON MAY.

La prezidanto informas, ke la Estraro proponas elekti 5-opan estraron. Claude GACOND kontraŭproponas elekti 7-opan estraron. La voĉdono donas jenan rezulton: por 5-opa estraro: 8 voĉoj; por 7-opa estraro: 9-voĉoj. Post tiu rezulto la 7 proponitaj personoj estas akklame akceptitaj por formi la novan estraron, kiu distribuos mem la taskojn inter si.

8: Elekto de la kaskontrolantoj: La prezidanto anoncas la kandidatecon de Dieter ROOKE (grupo Zürich) kaj Paul SCHERER (grupo Luzern), kiuj estas elektitaj per aplaŭdo.

9. Diversaĵoj:

Punkto 1: La prezidanto, en la nomo de la Estraro, informas pri la decido de la Fonduma Konsilio de Gastejo Edmond Privat datita 1996/10/22, laŭ kiu GEP pretas cedi ĉiun sian posedaĵon al KCE kontraŭ la simpla transpreno de ĉiuj siaj ŝuldoj. GEP konstatis, ke SES estas unu el la 'grandaj' kreditantoj, per sumo kiu egalas

fine de 1996 al 15'049.60 CHF. Tiu kredito estis pli ol la duoblo fine de 1995. Ĝi pli ol duoniĝis danke al la efika helpo de KCE. Sekve la Estraro de SES proponas al la Ĝenerala Kunveno - en kazo de transpreno de la ŝuldoj de GEP flanke de KCE-, akcepti la jenan rezolucion:

a) transformi la tutan krediton de CHF 15'049.60 de la konto 079 ĉe GEP al senrenta fonduso, destinita ekskluzive al la iniciatoj de Agado 2003,

b) la ĝis nun rikoltita mono por Agado 2003, kaj la posta (ĝis la atingo de CHF 15'050.-) estu deponita en la ĝenerala SKA-konto;

b) la mono priskribita en a) ne estu repostulita ĝis la komenco de 2002, nome ĝi estu blokita dum kvin jaroj, sen interezo;

d) inviti ĉiujn svisajn kreditantojn de GEP kaj poste KCE agi same kiel SES laŭ c).

Tiu ĉi rezolucio akceptiĝas per 14 voĉoj kaj 4 sindetenoj.

Punkto 2: Giorgio SILFER atentigas pri la lastatempa atakado kontraŭ Svislando rilate al anti-semitismo, kiu ankaŭ tuŝas la esperanto-movadon ĝis tia grado, ke eĉ la Akademio de Esperanto ne ŝatas starigi oficejon en Svislando. Giorgio SILFER apelacias emociplena al la svisaj esperantistoj ne resti sub tia antaŭjuĝo kaj informi eksterlandajn konatojn pri la veraj faktoj de tiu kampanjo,

ĉar ne ĉiuj svisoj estas kaj estis tiaj, kiaj oni nuntempe provas stampi ilin.

Por fini la prezidanto dankas al ĉiuj pro la subteno kaj dediĉemo. Post minuto da silento en la memoro al la membroj, kiujn ni perdis pro morto, nome Marcel ERBETTA, Elvine LEUTERT, René-William PERRENOUD, Maŭrico DE SASSI, la Ĝenerala Kunveno finiĝas je la 15h50.

Hermetschwil kaj Rotkreuz 1997/04/11: La protokolintoj: Anĝelo MELLINI kaj Sonja BRUN. 1997/06/31: Kontrolita de la prezidanto Bruno GRAF.

Heredaĵo

Rosa Marguerite Hautmann-Lüthy, forpasinta en septembro 1996, testamentis al SES la menciindan sumon de CHF 500.- Por tiu ĉi grandanima, surpriza kaj ne memkomprenebla donaco de nia tiama membro ni elkora dankas.

La Estraro

Donacoj

Ankaŭ viglan dankon ni esprimas al la ĉi-sekvaj donacintoj pro ties malavareco: D. Bertolini: 100.- F. Brügger: 78.- D. Bühlmann: 80.- T. Carlevaro: 50.- P. Dorthe: 15.- L. Dovat: 15.- C.

Gacond: 99.60 W. Gasser: 30.- E. Glättli: 15.- J. Hasler: 20.- R. Heer: 30.- A. Kessler: 20.- A. Koller: 45.- D. Lambercy: 5.- J.-J kaj E. Lavanchy: 100.- G. Merz: 30.- M. Moreillon: 40.- C. Nicolodi: 50.- R. v. Puijenbroek: 25.- B. Rüthemann: 40.- D. Rooke: 20.- H. Sandmeier: 5.- R. Schmid: 5.- L. Sennhauser: 45.- Chr. Sixtus: 30.- B. Spalinger: 5.- A. Veith: 5.- E. Walder: 5.- A. Weidmann: 15.-

Kunsidoj

La prezidanto Bruno Graf renkontis la redaktoron kaj arkiviston Claude Gacond en CDELI mem la 28an de junio por diskuti pri la punktoj: organizo de la metodika tago okazonta en Berno la 15an de novembro, informado pri esperanto kaj gazetara servo en Romandio, Argus, aperritmo de *SES informas*.

Bruno Graf same kunsidis kun Andy Künzli en Berno, kaj tiu lasta akceptis ekfunkciigi germanlingvan priesperantan informadon por la gazetaro. La unuan dupaĝan informilon li faksis la 1an de oktobro sub la titolo *Internationale Kommunikation aktuell LINGVO: Informationen für Presse und Öffentlichkeit der schweizerischen Esperanto-Gesellschaft*. Li diskonigis siajn unuajn artikolojn al Tazio

Carlevaro kaj Claude Gacond. Ankaŭ fakte Tazio Carlevaro tuj esprimis kelkajn interesajn kritikojn kaj sian konsenton italegi la venontajn informojn. Pere de la ARGUS-servo ni espereble konstatos kreskon de la priesperanta informado pergazeta.

S.E.S. informas

En mia redaktora laboro mi travivis aĉan komputilan aventuron. Meze de aŭgusto, kiam mi paĝigis la finredaktitan kvaran numeron de *SES informas*, pro misa ago mia elvaporigis la tuta laboro. Telefone mi devis repeti la raportojn diske ricevitaĵojn, ĉar vere nenio el ili konserviĝis. Sekvis tre streĉa laborplena periodo en CDELI mem ne nur pro la alveno de kunlaborantoj kaj esplorantoj, sed ĉefe pro esploroj cele al la akiro de konvena komputila sistemo kapabla katalogi plurlingvan libro-materialon. La ekzameno de diversaj sistemoj kaj la rilatoj kun ties programistoj forŝtelis mian tutan tempon. Nur ekde la semajnfino 25/26 de oktobro mi fine trovis la necesan trankvilon por la re-redaktado de tiu 4-a numero.

Por estonte eviti similan eraron, kiu povus ankaŭ elvaporigi aliajn gravajn dokumentojn, mi komplete renovigis mian komputilan aparataron. Zip-registritilo nun

ebligos al mi tagon post tago konservi kopion de la enhavo de la DOS-memorero. Kaj skanero donos al mi la eblon kopii fotojn kaj dokumentojn. La eniro en la pli modernan sistemon World 95 faciligos al mi la rilatojn kun la sendantoj de diskaj registraĵoj. Kaj mi min organizis, por ke mi disponu pri absolute liberaj semajnfinoj por la finredaktaj tempoj, ke mia redaktora laboro ne plu estu perturbita venontfoje.

La kvinan numeron ĉefe dediĉotan al la prezento de la **Agado 2003** mi redaktos la 16/17-ajn de novembro. La redakcia limdato por la alveno de raportoĵoj kaj informoj estos do la 13a de novembro 1997.

Oni konsciu, ke *SES informas* kapablos raporti pri okazintaĵoj kaj estontaĵoj nur se tiuj informoj min reale atingas letere aŭ fakse, kaj ankaŭ telefone por lastminuta atentigo.

Pardon-pete pro mia eraro tipa je komputilista komencanto.

Via Claude Gacond

-oOo-

Movada vivo

C.D.E.L.I

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, Biblioteko de la Urbo, Progrès 33, 2305 La Chaux-

de-Fonds, entreĵo: pordo nord-orienta.
☎ 032 967 68 55. Fakso: 032 967 68 29.

La arkivisto Claude Gacond, kiu deĵoras ĝenerale la matenon lunde, marde, merkrede, vendrede kaj sabate, volonte akceptas helpon de kunlaboremuloj. Tiuj ĉi anonciĝu telefone, por ke ilia tasko povu esti antaŭplanita. Vizitantoj kaj esplorantoj estas ĉiam bonvenaj.

I.L.E.I.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instrulstoj
Prezidanto de la Svisa ILEI-Sekcio:
François RANDIN, Valombreuse 14,
1004 LAUSANNE.

Protokolo

Ĝenerala kunveno de Svisa I.L.E.I.-sekcio

7an de septembro 1997
Cully/ Lausanne 14h25- 16h00

Senkulpigiĝoj: Tazio CARLEVARO kaj Jean-Thierry VON BÜREN.

Ĉeestis: Alain FAVRE, Claude GACOND (nur dum la komenco), Mireille GROSJEAN, Nicole MARGOT, François RANDIN.

La protokolo de la ĝenerala asembleo 1996a akceptiĝis unanime

Okazis elekto de nova sekciestro pro la demisio de Mireille GROSJEAN. Kiel nova prezidanto-sekciestro elektiĝis François RANDIN. Mireille restas

en la komitato, kie estas Jean-Thierry VON BÜREN kaj Claude PIRON. Estas do kvarhoma komitato.

Peto al ILEI: Antaŭ deko da jaroj ekzistis bela broŝuro en esperanto pri ILEI por varbo. SIS deziras ricevi ĝin, aŭ tian dokumenton, varbcele kaj por traduki ĝin nacilingven.

Kadre de la aktiveco okazanta ĉe KCE pri la temo ekzamenoj en Svislando je supera nivelo kun fakaj orientiĝoj, SIS deziras esprimi sin. Dum la diskuto prezentiĝis jenaj punktoj:

Oni devas nepre diferencii inter esperanto-instruistoj, kiuj estas profesie fremdlingvo-instruistoj, kaj la aliaj kadidatoj.

Oni devas nepre lertigi la kandidatojn al instruado al infanoj kaj al prenkreskuloj.

Devas okazi provleciojn, dum kiuj la lernantoj devas esti vere komencantoj aŭ progresantoj, sed ne iuj surlokaj esperantistoj, kiel ekzemple aliaj kandidatoj al la ekzameno. Resume: la ekzamenkondiĉoj devas esti realaj.

Ni ne akceptas, ke en la ekzameno pri la beletra fako estas instruado. Anstataŭ leciono devas okazi prelego.

Ni devas atenti, ke estu pedagogia formiĝo je ĉiuj niveloj, eĉ por instrui pri beletro al progresantoj. En Svislando konstatigas nuntempe giganta manko pri pedagogia kapablo ĉe

universitataj profesoroj; la studentoj devas nun prijuĝi ilin kaj devas retiriĝi la plej malbonaj instruantoj. La daŭro de tiu ekzameno devas esti plena jaro kun instruado kaj staĝo ĉe aliaj instruistoj, laboro kiel asistanto, frekventado de pedagogiaj seminarioj (kun atesto pri ĉeesto), diversaj provleciojn kun pli alt-nivelaj instruistoj kaj delegitoj de la ekzamena komisiono. Kaze ke ĉeesto de ekzamenanto ne eblas, povas esti filmo de la leciono.

Devas esti fiksitaj kriterioj por la pedagogia ekzameno. Propono por kriterioj: la lernantoj devas esti aktivaj, kontrolo de akiro, tempo, daŭro de la leciono (duaranga). Listo reviziota.

SIS proponos stabon de fakuloj, kiuj formos la ekzamenan komisionon pri pedagogio je supera nivelo.

Post la ekzamena provlecio la kandidato rajtu esprimi sin por mem analizi kaj recenzi sian lecionon. Poste la ekspertoj faru la samon.

La ĉeestantoj demandis sin, kiam okazis la lastaj ekzamenoj en Svislando.

La 15an de novembro okazos seminario pri pedagogio en Berno, dum kiu la diskuto pludaŭros. Tio signifas, ke la membroj de SIS havas nun la eblon pripensi la supre menciitajn punktojn, aldoni ion, modifi ion, ktp. Ĉiu bonvolu sendi materialon ĉirilatan al la

prezidanto François RANDIN,
Valombreuse 14, 1004
LAUSANNE.

Protokolis Mireille GROSJEAN,
Les Brenets. 1997.09.14.

J.E.S.

Junularo Esperantista Svislanda
Adreso: CP 32, 2416 Les Brenets.

Marion Bélisle raportas:

Ĉi-printempe JES organizis esperanto-kurson por komencantoj. Ĉefe multe varbis por ĝi Claudia kaj Vera en Lausanne, tiel ke kolektiĝis entute 12 gejunuloj la 12/13ajn de aprilo en Lausanne. François Randin tre agrable gastigis la kursanaron, kaj ankaŭ kuninstruis paralele kun Nicole Margot. La etoso estis bonega, kaj jam sufiĉe internacia!

Rezulto de tiu kurso jam vidiĝis, ĉar kvin el la komencantoj partoprenis la ĵus okazintan Internacian Junularan Kongreson de TEJO en Assisi (24-31.7.97), kaj je la fino de la semajno povis jam bonege elturniĝi en esperanto. Entute 13 gejunuloj reprezentis Svislandon tie, kvankam plejmulto tamen ne estis svisoj, kaj pri tio ni eĉ skeĉumis dum la internacia vespero...

Projektoj tujaj kaj foraj estas multaj, sed pri tio vi legos pli poste.

Grave: JES delonge intencas organizi skisemajnon fine de februaro 1998 (tria aŭ kvara

semajno), kaj nun neatendite ne havas loĝeblecon. Se vi konas ian ĉaledon en ski-regiono, por 20 ĝis 40 homoj, kie plej bone eblas mem kuiri, kaj ankoraŭ liberan por tiu periodo, bonvulu nepre telefoni al Claudia: 021 616 49 42. Antaŭan dankon!

Venonta semajnfina kurso de JES por komencantoj: la 22/23ajn de novembro en La Chaux-de-Fonds.

LF-Koop

Kooperativa Societo de "Literatura Foiro".
Adminstracio: CP 303, 1008 PRILLY.

Je la dato 1997.07.15 Judit Felszeghy, ĝenerala direktoro de LF-Koop, sendis al ni porinforme la 7-paĝan "trijaran laborplanon de LF-Koop por la periodo 1997-2000." Tiu ĉi dokumento, kiu detale listigas la taskojn kaj ties respondeculojn, konsulteblas ĉe CDELI.

S.A.E.F.

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj
Gertrud Eggenberger, Wurmühlstrasse 10,
8405 Winterthur. ☎ (052) 233 47 64

La bulteno *Svisa Fervojisto* N°166a (1997-septembro) raportas pri la partopreno de SAEF en la *Kultura Espozicio* je la 21a de septembro en Olten organizita de Svisa Federacio de la Fervojistaj Kultur-Organizaĵoj Espereble la stando: *Demonstrationen zur*

Weltsprache "Esperanto" montrigōs fruktodona.

T.E.J.O.

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Trideko da gejunuloj el multaj eŭropaj landoj partoprenis de la 4a ĝis la 11a de oktobro en la Junulara Gastejo de La Chaux-de-Fonds TEJO-seminarion dediĉitan al la temo **Edukado al Paco**. Unu posttagmezon grupo el ili vizitis min en CDELI por ke mi prelegu al ili pri la porpaca laboro de la esperantistoj Ernest Naville, Pierre Ceresole, Hector Hodler kaj Edmond Privat.

Claude Gacond

U.E.A.

Universala Esperanto-Asocio

Andreas Künzli (Berno), Mireille Grosjean-Robert (Les Brenets) kaj Marion Bélisle-Grosjean (La Chaux-de-Fonds) estis nomitaj de la Estraro de UEA ĝiaj *oficialaj reprezentantoj ĉe Unuiginta Naciaro*. Kiel unua ago sur tiu kampo, komence de julio, Andy Künzli partoprenis en kunsido de la Buroo de la Konferenco de la Neregistaraj Organizoj (NRG-oj) kun konsulta statuso ĉe EKOSOK (CONGO), kiu disvolviĝis en Placo de Nacioj en Ĝenevo.

Por printempo 1998a estas planita jubilea konferenco de UEA en Ĝenevo, okaze de la 50a jariĝo de Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj de la 90a jariĝo de UEA en la venonta jaro. Lige kun tio, mag. Claude Piron kun ties edzino antaŭ nelonge vizitis iun funkciulon de UN, komisie de la prezidanto de UEA, s-ro Lee Chong-Yeong. Lige kun tiu projekto de UEA estis kontaktita ankaŭ Bruno Graf, prezidanto de SES, kiu anoncis sian intereson kunlabori, pri kio s-ro Lee esprimis sin kontenta.

Aŭstralio kantas sian historion

Inter la interesaj rezultoj el la 82a Universala Kongreso okazinta en Adelajdo (Aŭstralio) ni nepre menciui la 36-paĝan libreton *Aŭstralio kantas sian historion* kaj ties akompanan kompaktdiskon *Unu voĉo*. Kiel prave skribas Margaret Furness en akompana cirkulero, unu el la kantistoj bedaŭrinde havas aĉan aŭstralian elparolon. Tamen la disko kaj la libreto estas aĉetindaj, des pli ke por ĉiu kanzono estas donitaj la muzik-notoj. Tiel muzikemuloj povos kante mem migri tra la aŭstralia kontinento.

-oOo-

Lokaj societoj

Basel

Esperanto Societo Basel

PF 103, 4005 BASEL. ☎0049 76 214 57
12. Kunvenoj: 20.00 en Altersheim,
Neubad.

La trilanda renkontiĝo antaŭvidita por la 7/8aj de junio ne okazis pro nesufiĉa nombro da aliĝoj. Tio ne malkuraĝigis la bazelanojn, kiuj akceptis transpreni la organizon de SES-tagoj okazantaj la 21/22ajn de marto 1998. Post la Ĝenerala Kunveno de SES la programo proponos vizitojn de la urbo kaj de la Tinguely-Muzeo, prelegon de Claude Piron, prezenton de filmo de François Randin, esperanto-kursojn kaj ekzamenojn. Ĉiuj nepre rezervu en sia kalendaro tiun gravan semajnfino.

Jam okaze de sia kunveno de la 23a de oktobro la bazelanoj detalege diskutis pri la organizo de tiu semajnfino.

La kunveno de la **ĵaŭdo 27a de novembro** estos dediĉita al analizo de la gramatika, leksika kaj stila evoluo de esperanto. Claude Gacond komparigos du versiojn de letero de L.-L. Zamenhof, la zamenhofa kaj modernigita reverkita de Claude Piron.

Bern

Ĉiuj instruemuloj aliĝu al la metodikana tago de la 15a de novembro.

La Chaux-de-Fonds

CDELI

Esperanto-studo

La duajn kaj kvarajn merkredojn de la monato inter 19h45 kaj 21h45: studo de esperanto kun Claude Gacond en la CDELI-salono. Se la enirpordo estas ŝlosita: sonorigu. La venontaj stud-vesperoj okazos do la 12an kaj 26an de novembro kaj la 10an de decembro.

Kultura Centro Esperantista

Postiers 27, 2301 LA CHAUX-DE-FONDS. ☎032 926 74 07.

Pri ekzamenoj

Finfine Svislando akiris ekzamen-regularon aprobita de la Asembleo de KCE la 25an de januaro kaj ratifita de la Ĝenerala Kunveno de SES la 15-an de marto. La decidita sistemo taŭgos por enlandaj kaj internaciaj diplomoj.

Talentaj muzikistoj

Tomasz Chmielik, instruisto de la germana kaj de esperanto en la gimnazio de Svidnik apud Lublin (Pollando), kaj kunlaboranto de CDELI, feriadis ĉe KCE dum

deko da tagoj kun 12 lernantinoj, sia filo kaj 3 kolegoj. La 9-an de septembro la lokaj esperantistoj, kiuj frandigis al ili fonduon, estis rekompensitaj per eksterordinara koncerto. Akompanataj de sia muzik-profesoro tri junulinoj kantis polajn folklorajn kaj esperanto-poemojn, kiujn la profesoro mem muzikigis.

Poste, reveturante hungarien ili estis invititaj de Stanislaw Skorupski por reokazigi tiun muzikaĵon kadre de festo ĉe la pola katolika paroko en Zürich. Ankaŭ tie la publikon entuziasmigis la talento de la junaj kantistinoj kaj de ilia profesoro.

Tre sukcesa semajnfino

La renkontiĝo kun la nobelaŭreato Reinhard Selten venigis dudekon da interesatoj pri la ludoteorio. Kaj la komuna manĝo kaj la vespero transportis ĉiujn al Ĉinio dankal la kuirista kaj prelega talento de Sabira Stahlberg.

Okazontaĵoj

Novembre 29/30ajn: Historia monاتفino kun Birthe Lapenna (Danlando) pri *Ivo Lapenna (1909-1987): liaj vivo kaj verkaro* kun historiografia helpo de Giorgio Silber. Paralele Claude Gacond gvidos lingvan studrondon por progresantoj: lego de eroj el la romano *La longa vojo*

de Richard Meye kaj paroligaj ekzercoj.

Jarfine de la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro 1998: feriado kun silvestra nokto, lerno de ŝakludaj sekretoj kun Nicola Palladino, ligno-arto kun Tamas Szabo, filmoj, ekskursoj.

Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

PF 188, 1211 GENÈVE 20. ☎022 740 04 45. **Kunvenoj:** 18.15 en Restoracio Manora, Cornavin 4.

Laŭ la organo *Brasikfolio* jen kiam okazos la venontaj kunvenoj:

Novembre la 4an kun prelego de Anita Altherr pri Cipro.

Decembre la 2an.

Januare 1998 la 10an: Zamenhofa Festo.

Februare la 3an.

Marte la 3an.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

PF 389, 1009 PULLY. ☎021 729 58 02

Kunvenoj: 20h30 en la Stacidomo en la unua etaĝo. **Babila rondo** en la hotelo "Continental" fronte de la stacidomo okazas ĉiumonate la 3an lundon.

La **Narcisa Semajnfino** okazinta la 24/25ajn de majo grupigis 18 partoprenantojn. La kampoj blankis ne pro neĝo, sed pro narcisoj. La suno konsentis forigi la pluvon kaj la panoramo aperis

grandioza. Ĉiuj ĝuis promenojn kun admiro kaj pluko de mont-floroj. Amikoj neesperantistaj alvenis dimanĉe por partopreni la komunan tagmanĝon.

Prelego de Claude Piron en la hotelo *Continental* kunigis 80 interesatojn la 4an de junio. Tiu sukceso estas la frukto de mult-afiŝa informado kaj de televida intervjuo de Claude Piron realigita de Jean-Marc Richard dum la paŭzo inter la duparta elsendo pri la urba konsilio. Claude Piron kaptis la atenton de sia publiko dum 2 horoj. Li alportis multajn novaĵojn ankaŭ al la esperantistoj mem. La intereso de la aŭskultantoj esprimiĝis per multaj demandoj. Inter ili fakulo pri lingvoj vigle kaj inteligente alparolis ĉinlingve la preleganton. Al la gazetaj redakcioj la organizantoj fakse sendis 24 invitilojn, kiuj bedaŭrinde ricevis nenium eĥon.

Per artikoloj aperintaj en *Gazette de Lausanne* kaj *24 heures de Lausanne*, la 29an de julio ni eksciis, ke okaze de la Universala Kongreso en Aŭstralio la filmo *La Alpoj Svisaj* de François RANDIN estis akirinta la *Oran palmon* okaze de la internacia festivalo pri la filmoj en esperanto. Ni ne nur esprimas niajn gratulojn, sed ankaŭ la esperon, ke multaj esperantistoj akiros tiun ĉi novan filmon.

La 4an de septembro Anjo Amika kun granda sukceso prezentis sian kant-programon *Por vidi la mondon* en la kampingejo de Vidi kun la traduka apogo de membroj de Laŭzana Esperanto-Societo. Du tagojn poste kadre de la Kultura Semajnfino de SES en Cully, ŝi havis la okazon refoje anonci la aperon de sia venonta kasedo per la interpreto de la sama repertuaro.

Tiu regiona Kultura Semajnfino grupigis tridekon da partoprenantoj. La komencantojn instruis Sonja Brun kaj la progresantojn Monika Molnar. Paralele al tiuj studrondetoj la esperantistoj aŭskultis kun vigla intereso la verkiston André Cherpillod. Sabate li rakontis al ni pri la mortotuko de Torino kaj dimanĉe pri Zamenhof kaj la judismo. Ambaŭfoje li montriĝis pasiiga preleganto, kiun ĉiuj estus aŭskultintaj ankoraŭ pliajn tagojn. Tial liaj libretoj vekis la aĉetemon de multaj. Dankon al Nicole Margot kaj al ties laŭzana helpantaro pro la modela organizo de tiuj renkontiĝoj en Hotelo Major Davel situanta en belega loko borde de la lago Lemano.

Venontaj kunsidoj: Novembre 3: prelego de C. Gessler pri JES.
Decembre 14: temo anoncota.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 EMMENBRÜCKE. ☎041 280 46 12. Kunvenoj: 29h30 en Hotelo Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, Emmenbrücke (trolebuso 2).

Novembro 27: Paul Scherer: Programo por la jaro 1998.

Venontaj paroligaj kunvenoj en restoracio **Big Ben**, Winkelriedstr. 39, Lucerno je la 14.00: novembre 5, decembre 3.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

S. POCHANKE, Letenstr. 70, 9500 Wil. ☎071 911 68 30. Kunvenoj: 20.00 en la Restoracio Schweizerhof, Unt. Bahnhofstr. 18.

Novembre 12: B. Pochanke: La familio Silbernik kaj ties kontribuo al esperanto.

Decembre 10: Zamenhofa Vespero kun Ch. Fabri.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH. ☎01 25 150 25
Kunvenoj: 19.15, Eisengasse 22, 8034 Zürich

La prelego de Claude GACOND pri la temo "Konatiĝu kun la "perfidulo" Louis de Beaufront" okazinta la 14-an de aprilo inspiris tiun ĉi soneton al Jan StanislaW SKORUPSKI:

mi aŭdis pri la saĝa homo
"putine" naskita en timo
krom restis li super la limo
de l' dudekjarcenta sindromo

li moke estis katoliko
nur je sia bono kredanta
eĉ en novaj lingvoj verkanta
eble ankaŭ "paranojiko"

vokante sin mem per markizo
fariĝis mitomaniulo
por stultuloj granda surprizo

nobela bastardo jam mutas
postmorte aĉa perfidulo
ĉiele kun Dio disputas

Esperante parolata mallong-filmo "*La eta knabino*" de la konata svisa reĝisoro Samir estis unuafoje prezentita la merkredon 13an de aŭgusto dum la film-festivalo de Lokarno en Tiĉino. La dialogojn esperantigis Dietrich Weidmann sub la aŭspicio de la tradukfirmao *Allsprachendienst* kaj de Esperanto-Societo Zuriko kun kontrolo de Claude Piron. La filmo estas esperante parolata kun nacilingvaj subtitoloj kaj ĝi estis originale filmita en esperanto mem.

-oOo-

Revuoj

La internacia kultura-literatura revuo "Iltis-Forumo" redaktata de Reinhard HAUPENTHAL ĵus ĉesis aperi. Tion ni mencias, ĉar

ĝia lasta kajero 1995-3 aperinta fakte en majo 1997 estas 17-paĝe dediĉita al Svislando. Unue Arthur BAUR raportas pri "la historio de la esperanto-elsendoj el Svislando" Sekvas "kroniko pri la svisa planlingva movado" verkita de Andy E. Künzli kaj statistika analizo de Henri VATRÉ pri la "ofteco de la sufiksoj -ig kaj -iĝ en kelkaj tradukoj". Bedaŭrinde fuŝas tiun aĉetindan kajeron du tipaj haŭpentalajoj: nuancomankaj kaj sentaktaj recenzoj pri la tezlaboro "*Ethnographie de la communication dans un milieu social exolingue*" de Lilli PAPA-LOIZOS, 1992, kaj pri la ĵus aperinta aŭtobiografio de Hans JAKOB (1891-1967) "*Servisto de l' ideo. 50 jaroj ĉe Universala Esperanto-Asocio. 1908-1958*".

Rebato kontraŭ tiuj supraĵaj kaj tede agresemaj artikoloj ne indas. Tiuj artikoloj certe fuŝkonkludas la sep-jaran kolekton de Iltis-Forumo, komprenigante, ke la morto de tiu revuo ne nur fontas el ekonomia krizo, sed ankaŭ el rilata problemaro.

Nur koncerne la artikolon de mia ekskolego ĉe Svisa Radio Internacia mi ŝatus alporti reĝustigon. Arthur BAUR interese rememorigis la naskiĝon de la kurtondaj esperanto-elsendoj en 1946 per la kvinminutaj elsendoj semajnaj de Edmond Privat, kiu estis tiam konata ne nur kiel fond-

into de *Radio Genève*, sed ankaŭ kiel membro de la gvidaj instancoj de *Schweizerischer Radio-Gesellschaft*. Arthur Baur prave memorigas, ke Edmond Privat kunlaboris preskaŭ ĝis sia morto en 1962, sed koncerne al liaj posteuloj lia raporto ne estas ekzakta. Li mencias min en 1962 kiel direktoron de KCE en La Chaux-de-Fonds, sed KCE fakte fondiĝis nur 6 jarojn poste en 1968 kaj instaligis en La Chaux-de-Fonds nur en 1974. Indas do, ke mi precizigu la faktojn en ties realaĵoj, por ke neĝustajoj ne ripetigu en la verkota historio de la svisa esperanto-movado.

Edmond Privat estis la honora prezidanto de la instruista asocio Esperanto-Edukistaro de Svislando, kiun prezidis Charles Ecabert, instruisto de la latina lingvo en la duagrada lernejo en Neuchâtel kaj kiun sekretariis mi mem, tiam instruisto en la vilaĝo La Sagne. Ni havis regule la okazon renkontiĝi triope kaj fine de la jaro 1961 Edmond Privat petis nian helpon por la daŭrigo de la radia prelegado. Charles Ecabert akceptis transpreni la prelegistan funkcion nur kondiĉe, ke mi startu apud li kiel ebla anstataŭanto, kaj ni ambaŭ pretigis kelkajn prelegojn.

Charles Ecabert fakte nur havis la eblon prezenti 4 siajn prelegojn, kiam Edmond Privat ĉesis veturi al Berno pro subita hospitaliĝo en

Gland, kaj samjare jam la morto ankaŭ frapis lin. En tia drama situacio komenciĝis mia prelegista laboro: unue per la anonco de la malsaniĝo de mia kolego kaj per la laŭtleĝo de teksto de li verkita, kaj poste per la anonco de lia morto kaj per la prezento de miaj kontribuajoj. Ne ĝojplena estis la komenco de mia tridekjara kariero ĉe Svisa Radio Internacia kaj la daŭrigo de mia poresperanta aktiveco kadre de Esperanto-Edukistaro de Svislando.

Claude Gacond.

-oOo-

Libroj

Ĉi-numere mi atentigas la legantojn pri du aĉetindaj libretoj de André Cherpillod, kies trastudon mi konsilas ne nur al la instruantoj, sed ankaŭ al ĉiuj progresantoj:

La 32-paĝa broŝuro titolita "L. L. Zamenhof: datoj, faktoj, lokoj, okaze de la 80a datreveno de lia morto" estas modelo de resuma biografio. Al la instruantoj ĝi alportas utilegan helpon, kiam ili devas raporti pri la vivo de Zamenhof. Kaj menciindas, ke André Cherpillod korektas plurajn erarojn pri datoj kaj nomoj, kiuj ripetiĝis ĝis nun en biografioj kaj eseoj pri la aŭtoro de esperanto. Tial lia broŝuro estas fidinda kontrolilo.

"**PO la diabla vorto**" estas alia dokumento epokfara. Ekde ties apero en 1996 ni finfine havas didaktike modelan instruilon, kiu helpas ĉiujn malpli fuŝuzi la iom misteran vorteton **po**. Ne nur la lernantoj travivontaj ekzamen-aventuron, sed ankaŭ ties instruantoj ilin juĝontaj, finfine disponas bazan dokumenton nekritikeblan. Ankaŭ la grup-gvidantoj, la redaktantoj de lokaj bultenoj, la prigramatikaj disputemuloj, antaŭ ol subjektive pravigi la propran **po-uzadon**, povos intimiĝi kun la reala kaj certe necesa rolo de tiu vorteto. Do ĉiu atente legu la 19 paĝojn de la broŝuro de André Cherpillod. El tiu trastudo rezultos ne nur propra gramatika progreso por multaj, sed ankaŭ ĝenerala konscio, ke eĉ la vorteto **po** indas je respekto.

Claude Gacond

-oOo-

Komuniko kaj Anoncoj

Svisa instru-instanco interesiĝas pri esperanto

Naskiĝanta laborgrupo nomata "*vekiĝo lingven*" ekrlatis kun Mireille Grosjean, instruistino de fremdaj lingvoj kaj esperantistino, celante ŝian eniron en la laborgrupon kunlaborcele. La kialo de tiu alvoko estas ŝia kono de esperanto. La taskoj de tiu laborgrupo estas prepari aktivecojn, kiuj helpu al infanoj inter 4 kaj 15 jaroj por la lerno de fremdaj lingvoj. La laborgrupo kreis organon nomatan COMORE (*Commision romande pour les moyens d'enseignement*), kiu estas romanda komisiono por lerniloj. Temas pri interkantona instanco franclingva. Tiuj okazajoj iel konstatigas, ke okazas pozitiva evoluo favore al esperanto en svisaj instruinstancoj.

Korespondpeto

Karaj Samideanoj!

Mi estas kvardekkvarjara inĝeniero tre interesata pri via lando. Do, mi turnas min al vi kun espero trovi korespond-amik(in)on. Mi interesiĝas pri diversaj temoj.

Koraj salutoj.

Mia adreso:

Jerzy MICHOLSKI

Pocztokla 9

PL-26-660 JEDLINSK

(Pollando)

Filmoj NANDIR

Poŝtfako 1258, 1001 Laŭzano

La Ega Kesteto

Polica filmo 7-lingva

La Verda Stelulo

Sciencfikcia filmo

La Alpoj Svisaj

Dokumenta filmo

Vendoprezio: po CHF 40.-